

## Disvolviĝo de la mondanistaj ideoj, 3-a parto Claude Gacond, 58-a radioprelego, 1964.01.08 & 11

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la disvolviĝo de la mondanismaj ideoj.

En la monato oktobro 1963 dum du elsendoj ni ekzamenis kiel naskiĝis iom post iom la mondanismo. Ni revenu hodiaŭ al tiu aktuala temo.

Ekde 1945 la mondanistaj ideoj formuliĝas ĉiam pli precize. La Ĉarto de la Unuiĝinta Naciaro ne kontentigis la seriozajn internaciajn juristojn. Pro tio multaj movadoj, kies celo estis la reformo de la Ĉarto de UN, fondiĝis en plej diversaj lokoj iom ĉie en la mondo. En 1946 okazis en Luksemburgo Unua Internacia Federalista Kunveno. Tiu manifestacio alportis la necesajn kontaktojn, kiuj ebligis kunvoki 37 organizaĵojn el 14 landoj al grava kongreso. Ĝi okazis en Montreux (Svislando) en 1947 kaj permesis fondi la Universalan Movadon por Monda Federacio. 52 organizaĵoj el 23 landoj estis reprezentitaj. Projekto de Asembleo de la Popoloj estis lanĉita.

La saman jaron en Usono la Komitato de la Atomistaj Sciencistoj sin prononcis favore al Monda Registaro kaj proponis la fondon de Konstituciantaro de la Popoloj. Albert Einstein troviĝis inter tiuj atomistoj.

La postan jaron, do en 1948, 12 profesoroj publikigis en Ĉikago (Usono) projekton de Monda Konstitucio, tio sub la direkto de Borgese. Kaj en Granda Britujo Henry Osborne estis elektita deputito ĉe la Brita Parlamentejo post kampanjo bazita sur la mondanismo. Tiu fakto estas diskonenda, ĉar kutime la politikistoj evitas la temojn, kiuj ŝajnas utopiaj al la vasta publiko. Pro tiu sinteno la publiko tro ofte ne estas informita sufiĉe frue de la necesaj ŝanĝoj okazigendaj en la monda politika vivo. Ĝi do ne kapablas ŝanĝi sian pensmanieron, aŭ havas la impreson esti trompita de siaj deputitoj.

Ankaŭ en 1948 la gesto de Garry Davis, kiu rezignas pri sia usona nacieco kaj sin proklamas mondcivitano, multe progresigis en la granda publiko la informadon pri mondanismo. La 12-an de septembro 1948 Garry Davis, dum sesio de la Unuiĝinta Naciaro, petis la kreon de vera Mondregistaro. La ĵurnalistoj kaj radio-intervjuistoj diskonigis lian penson raportante pri lia gesto. Garry Davis ricevis centmilojn da leteroj. Granda kunveno okazis en la kongresejo Pleyel en Parizo, propagand-vojaĝo tra la francaj provincoj ekorganizis registradon de personoj, kiuj sin proklamis mondcivitanoj. En la manĝejo de la uzino Férodo estis proklamita Pakto de Mondcivitanoj. Dank'al tiu vasta propagando en unu jaro preskaŭ tri cent mil personoj el 78 landoj aĉetis la legitimilon pri mondcivitaneco. En Berlino laboristara manifestacio grupiĝanta 45 organizaĵojn kaj kunlaboranta kun 82 gazetoj subtenis tiun kampanjon de Garry Davis. Abato Pierre ludis grandan rolon en ĝi.

En 1950 komenciĝas la unuaj mondanigoj de urboj aŭ komunumoj. La plej rimarkindaj estis tiuj de Cahors (Francio), kies ceremonion prezidis Lord Boyd Orr, de Florenville kaj Nivelles (Belgio), de Chelmsford (Britujo) kaj Königswinter (Germanio). En tiu sama periodo la studentoj de la Universitato Upsala (Svedio) sin deklaris mondcivitanoj. Diversaj gazetoj fondiĝis. Inter la plej gravaj ni citu : *Le Mondialiste* kaj *Le Peuple du Monde*, kiuj uzas la francan lingvon, *The World Citizen*, kiu aperas en la angla. Okaze de la tria kongreso de la Universalaj Movado por Monda Federacio prov-elektoj okazas en Anglujo, Belgujo, Danujo, Hindio, Japanio kaj Pakistano. Unu jaron poste similaj balotoj rekomenciĝas. Ili estas tute oficialaj kaj baziĝas sur la principo de po unu deputito por loĝantara miliono. Tri deputitoj estas tiel elektitaj en la usona ŝtato Tenessee : ili estas F. Fermer, J. Avery kaj W. Herwell. Unu deputito estas ankaŭ elektita en Niĝerio, li nomiĝas Eyo Ita.

En Parizo Abato Pierre pledas en la Parlamentejo favore al mond-elektado de deputitaro por Mondkonstuciantaro.

## Disvolviĝo de la mondanistaj ideoj, 3-a parto Claude Gacond, 58-a radioprelego, 1964.01.08 & 11

Oni povas diri, ke tiu periodo de mondanismo kaj eble iom facila entuziasmo estas kronata de la gravega manifestacio, kiun prezidis Edmond Privat en 1951 ĉe la Palaco de la Nacioj de Ĝenevo. Ĝi estis titolita Unua Konsultativa Asembleo de la Popoloj kaj grupigis 500 personojn el 50 landoj. La mandatoj de la kvar elektitaj deputitoj estis entuziasme validigitaj. Dank'al tiu manifestacio kontaktoj okazis inter diversaj organizaĵoj kun paralelaj celoj : inter ekzemple la Universala Movado por Monda Federacio kaj la partizanoj de Garry Davis, kiuj sin iom rapide proklamis mondcivitanoj. Du agadpensoj sin alfrontis : la unuj celis reformi la ekzistantajn mondorganizaĵojn, la aliaj deziris provoki grandan popol-devenan agadon.

En tiu Asembleo oni multe parolis, eĉ iom tro ofte disputis. Edmond Privat devi ludi la malfacilan rolon de arbitro inter sektemuloj kaj teoriemuloj. Tamen io naskiĝis el tiuj debatoj. Tio estas la Monda Konsilantaro por Konstituciantara Asembleo de la Popoloj. Ĝia ĉefa celo estas kunordigi la agadon, ĝis tiam tro disan, de ĉiuj tiamaj organizaĵoj por mond-federalismo.

La homoj estas tre ofte senpaciencaj. Pro tio multaj personoj, kiuj sin facile proklamis mondcivitanoj konstatinte, ke ne tuj estis kreita Mond-parlamentejo kaj Mond-registaro, rapide laciĝis. Tiu fakto pravigis la tendencon, kiu en Ĝenevo volis reformon kaj plibonigon de la ekzistantaj organizaĵoj. Tiuj luktoj por mondfederalismo estis tro abstraktaj por daŭre entuziasmigi vastajn publikajn tavolojn.

La evoluo de la mondfederalismo tamen montris la neceson de ambaŭ tendencoj. Juristoj ne povos trudi reformojn al la mond-organizaĵoj, se ili ne ricevas apogon de la publika opinio.

Vi aŭdis prelegon de Claude Gacond pri la disvolviĝo de la mondanistaj ideoj. Se tiu temo vin interesas, aŭskultu regule Radio-Svislandon, kaj se vi partoprenis en la priskribitaj luktoj aŭ deziras esprimi opinion, ne hezitu skribi al ni.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-